

# *Esperanto en la Internacia Tago de Paco: Klimata Agado por Paco*



Ĝiujare, tra la tuta mondo, oni festas la Internacian Tagon de Paco kaj la Esperanto-komunumo tra la mondo aliĝas al tiu ĝi festado kiel bone atestas mesaĝo sendita de Universala Esperanto-Asocio per oficiala gazetara komunikado.

Per ampleksa mesaĝo UEA atentigas ke la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj deklaris la 21-an de septembro tago dediĝita al plifortigo de la idealoj de paco ene de, kaj inter, ĝiuj nacioj kaj popoloj.

La membroj de UN akceptis la 17 Celojn por Daŝripova Evoluigo en 2015 ĝar ili komprenis, ke ne eblas konstrui pacan mondon se oni ne ekpaŝos por atingi ekonomian kaj socian evoluigon de ĝiuj homoj ĝiuloke, kaj certigi la protekton de iliaj rajtoj. La 17 Celoj tuĝas larĝan gamon de demandoj, inkluzive de malriĝo, malsato, sano, edukado, klimato, seksa egaleco, akvo, higieno, energio, la natura medio kaj socia justeco.

La 13-a Celoj por Daŝripova Evoluigo, “Agado pri Klimato”, alvokas al tuja agado por malaltigi varmigajn emisiojn, kreskigi klimatan ĝanĝreziston, kaj plibonigi klerigon pri klimata ĝanĝiĝo.

*Klimata Agado por Paco* estas la temo de la ĝi-jara Internacia Tago de Paco. ĝi atentigas pri la graveco kontraŝtari klimata ĝanĝiĝon por protekti kaj disvastigi pacon tra la mondo.

Klimata ĝanĝiĝo pligrandigas minacojn kontraŝ internaciaj paco kaj sekureco. Naturaj katastrofoj dislokas trioble pli da homoj ol dislokas militaj konfliktoj. La saligo de akvo kaj rikoltoj endanĝerigas nutraĝan sekurecon, kaj ties negativa efiko je publika sano daŝre altiĝas. Kreskantaj streĝitecoj pri naturaj rimedoj kaj pro amasa moviĝo de homoj evidentas ĝiulande en ĝiu kontinento.

Paco estos atingebla nur se okazos konkreta agado por kontraŝbatali klimata ĝanĝiĝon. La 23-an de septembro, Unuiĝintaj Nacioj kunvenigos Pintkonferencon pri Klimata Agado, kun konkretaj kaj realismaj planoj por pli rapida agado al plenumo de la Pariza Interkonsento pri Klimata ĝanĝiĝo.

La Esperanto-movado, per sia tutmonda reto de komunikado, povas ludi signifan rolon en la pozitiva agado por paco kaj klimato. Ni alvokas al esperantistoj ĉie en la mondo dediĉi sian atenton, okaze de la Internacia Jaro de Paco, al tiu ĉi esenca demando. Sendu viajn ideojn, kaj raportu pri via agado, pere de #PeaceDay kaj #ClimateAction.

---

<http://www.radiohc.cu/eo/especiales/exclusivas/202762-esperanto-en-la-internacia-tago-de-paco-klimata-agado-por-paco>



**Radio Habana Cuba**